# NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos" Esperanto Amika Rondo**

# ÉSZAKMAGYARORSZÁGI HÍR

**A „Király Lajos" Eszperantó Baráti Kör Tájékoztatója**

2007. Március
Marto 2007.

MÁRCIUS ... 3
A MASSZÁZS ... 3
MARTO ... 4
LA MASAĜO ... 4
A NAPOZÁSRÓL ... 5
IOM PRI LA SUNBANIĜO ... 5
VICCEK / ŜERCOJ ... 6
HÍREK / ANONCOJ ... 7
Nemzetközi Nőnap Hirosimában ... 11
HIROSIMAI NŐNAPRA – 2007 ... 11
Internacia Virintago en Hirosima ... 12
AL VIRINTAGO DE HIROSIMA – 2007 ... 12
Vietnami Eszperantista Fiatalok ... 13
Vietnama Esperantista Junularo ... 13
ADA SIKORSKA-FIGHIERA ... 14
IDÉZETEK ... 20
CITAĴOJ ... 21
Vi silentas ... 21
KIRÁLY LAJOS ... 21
LUDOVIKO KIRÁLY ... 21
„Augusztusban Miskolcon lesz az Országos Eszperantó Kongresszus” ... 22
„En aŭgusto estos en Miskolc la Landa Esperanto-Kongreso” ... 23
Csiga biga ... 25
AZ ÉHSÉG NAGY ÚR ... 25
SE LA MALSATO TURMENTAS ... 26
BÖLCS MONDÁSOK / SAĜECAROJ ... 28
A 92. Egyetemes Eszperantó Kongresszus ... 28
JAPÁN FÖLDRAJZA ... 28
YOKOHAMA ÁLTALÁBAN ... 30
JAPÁN TÁRSADALOM ... 31
LA 92. UNIVERSALA ESPERANTO-KONGRESO ... 32
Japanio, la ĉi-jara kongreslando. ... 32
JAPANIO GEOGRAFIE ... 33
Kie estas Japanio? ... 33
Ĉu Japanio estas tropika lando? ... 33
Ĉu neĝas multe en Tokio kaj Jokohamo? ... 33
Ĉu Japanio estas ebena lando? ... 33
Kial oftas tertremoj? ... 33
Kiel pri jarsezonoj? ... 34
JOKOHAMO ĜENERALE ... 34
Ĉu Jokohamo havas longan historion? ... 35
Kia urbo nun estas Jokohamo? ... 35
Kie estas la kongresejoj de la UK? ... 35
Kia estas la Esperanto-movado en Jokohamo? ... 35
JAPANA SOCIO ... 35
Kial Japanio tiel rapide progresis post la dua mondmilito? ... 35
Kiaj estas japanaj urboj kaj homoj? ... 36
Kiaj estas la nunaj sociaj problemoj? ... 36

**MÁRCIUS**



**Hóvirág / Neĝborulo**

**Kedves Olvasóink!**

Eljött a tavasz első hónapja a március. A tél folyamán beszéltünk egészségi állapotunk, szépségünk megőrzéséről. Most folytatjuk ezt a programunkat, hasznos tanácsokat, információkat adva Önöknek, Mindnyájuknak.

## A MASSZÁZS

Beszélhetnénk most a masszázsról, de helyette azt javasoljuk, hogy kérjenek tanácsot annak igazi mesterétől.
A reflexológiáról sokszor olvashatunk és sok helyen. Lehet, hogy csak kevés ember van, aki erről mostanáig semmit sem hallott. Mégis, akik megpróbálták és eléggé kitartóan végezték a gyakorlatait az annak megfelelő ideig, bizonyára jó tapasztalatokat szereztek az eredményeket elérve. Ha Önök jól szeretnék elvégezni a talp- vagy más testrészük masszírozását, szíveskedjenek tanácsot kérni eszmetársunktól **Zelimir Pehár** elnök úrtól, aki *Tajvanon* él és a MondEtur nevű eszperantó csoportjával pontosan ezeknek az egészségmegörző programoknak a gyakorlásával foglalkozik.

E-mail címe: info@mondEtur.net
A web. lapja működésük bemutatását szolgálja: www.//mondmtur.net

Pásztor lászlóné

## MARTO



Printempaj floroj

**Karaj niaj legantoj!**

Alvenis la unua monato de la printempo. Dum la vintro ni parolis pri la necesa gardo kaj plibonigo de nia sanstato kaj beleco. Nun ni daŭrigas nian ĉi programon, utilajn konsilojn kaj informojn donante al vi ĉiuj.

## LA MASAĜO

Ni povus paroli nun pri la masaĝo sed anstataŭ tio ni proponas, ke vi petu konsilojn de ĝia vera majstro.

Pri la refleksologio ni povas legi multfoje, multloke. Povas okazi, ke nur malmultaj homoj povas esti, kiuj neniom aŭdis pri tio ĝis nun. Tamen, kiuj elprovis kaj sufiĉe persiste faris ties ekzercojn dum necesa tempo, certe rikoltis bonajn spertojn akirinte rezultojn.

Se vi ŝatus bone fari la masaĝon de via plando aŭ de alia korpoparto, bonvolu peti konsilojn de nia samideano prezidanto Zelimir Pehar, kiu loĝas en Tajvano kaj lia Esperanto grupo MondEtur okupiĝas ĝuste per tiuj sanoflego-programoj.

Lia retadreso estas: info@mondetur.net

Lia retpaĝo servas la informdonojn pri ilia funkciado: www.mondetur.net

Adrienne, s-rino Pásztor

## A NAPOZÁSRÓL

Most, hogy eljött a tavasz, beszélnünk kell a napozásról is. Az érzékeny bőrre nagyon ártalmas lehet a napsugárzás a szeles időben. Ezért, bőrünket fokozottan óvnunk, védenünk kell. Lépésenként kell hozzászoktatnunk bőrünket – kihasználva az első tavaszi napsugarakat – az erősebb nyári napfényhez. A tűző napon hirtelen elkezdett napozás a bőrt sorvadttá, ráncossá teszi. A tudósok szerint ennek az oka a megsérült légkörön át bejutó ultraviola sugarak károsító hatása. Kiszűrhetők ezek a sugarak fényvédő készítményekkel, melyek a barnulást nem akadályozzák, csak visszaverik, vagy elnyelik a károsító hatást.
A napozás kiszárítja a bőr felső rétegeit, ezért fürdés után használjunk hidratáló testápolószert, és használhatjuk a természet ajándékjait is, a gyógyfüveket. Mint ahogyan már korábban szóltam az otthon készíthető pakolásról, most is ajánlom ezek használatát. Otthon is készíthetünk pakolást: tejjel, tojással, élesztővel, gyümölccsel. A házi készítmények hatása sokrétű: vitamínt pótolnak, a vízhiányos fonnyadt bőrt regenerálják, nyugtató hatásúak, fokozzák a bőr vérellátását, s ami a legfontosabb: szépítenek és olcsók.

Pásztor Lászlóné

## IOM PRI LA SUNBANIĜO

Nun, ke alvenis la printempo, ni devas paroli ankaŭ pri la sunbaniĝo.
Por la sentema haŭto tre damaĝa povas esti la printempa sunradiado en ventema vetero. Tial, nian haŭton ni devas speciale gardi, ŝirmi. Ni devas alkutimigi nian haŭton - gradoj post gradoj per eluzo de la unuaj printempaj sunradioj – al la pli forta somera sunlumo.
Dum la bruliga sunradiado la subite komencita sunbanigxo igas la haŭton atrofita, falta.
Laŭ la sciencistoj la kaŭzo de ĉi tiu problemo estas la damaĝa efiko de la ultraviolo-radioj envenantaj tra la ozontavolo de la vundiĝinta atmosfero. Defiltreblaj estas ĉi tiuj radioj per la lumdefendantaj produktaĵoj, kiuj ne malhelpas la bruniĝon, nur reĵetas aŭ englutas la malutilan efikon. La sunbanado sekigas la superajn tavolojn de la haŭto, tial post la banado ni uzu akvohavan korpan-prizorgilaĵon (kremon) kaj ankaŭ ni povas uzebli la donacojn de la naturo: la kuracherbojn.
Kiel mi rakontis jam pli frue, ankaŭ nun mi proponas ties uzon. Ni povas fari refreŝigilaĵojn hejme: per lakto, kokinovo-flavo, fermento, fruktoj.
La efiko de la hejme faritaj produktaĵoj estas multspecia. Ili kompletige donas vitaminojn, regeneras la sekan, velkan haŭton, sedative efikas, pligrandigas la sangoprovizon de la haŭto, kaj kio la plej grava estas: plibeligas kaj malmultekostas.

Adrienne, s-rino Pásztor

## VICCEK / ŜERCOJ

### Szökevény

- Képzeld, Benőke, elrepült a papagájod! – újságolja az anyuka az iskolából hazaérkező gyereknek.
- Sejtettem, hogy így lesz.
- Miért?
- Mert tegnap, amikor földrajzot tanultam, a vállamra ült és nézegette a térképet.

### Szörnyűség

- Képzeld, elhagyott a férjem! – panaszkodik Kovácsné a barátnőjének.- Milyen szőrnyűség türténhet még velem?
- Az, hogy visszajön.

### Fuĝanto

- Imagu, Benĵameneto, forflugis via papago! – informis la panjo sian fileton, kiu ĵus alvenis el la lernejo..
- Mi sciis.
- Kial?
- Ĉar hieraŭ dum la ellernado de la geografio ĝi sidis sur mian ŝultron kaj rigardadis la mapon.

### Teruraĵo

- Imagu, forlasis mia edzo! – plendis sinjorino Kovács al sia amikino –
- Kia teruraĵo okazeblas ankoraŭ kun mi?
- Tio, ke li revenos.



A Molnár csárda Felsőhámorban a Bükkben
„Molnár-ĉardo" en la miskolca kvartalo Felsőhámor, en la montaro Bükk

**HÍREK / ANONCOJ**
**Könyvvásárlás**

A Magyarországi Eszperantó Szövetségnél vásárolható könyvek listáját az alábbi honlap címen tették közzé:

http://www.c.3.hu/esperantohea

A Magyarországi Eszperantó Szövetség új elérhetőségei:

http://esperantohea.ini.hu és http://hea.ini.hu

**Librovendado**

Sur la sekva retpaĝo estas publikata la listo de la esperantolingvaj libroj aĉeteblaj ĉe la Hungaria Esperanto-Asocio:

http://www..c.3.hu/esperantohea

La novaj atingeblecoj de la Hungaria Esperanto-Asocio estas:

http://esperantohea.ini.hu kaj http://hea.ini.hu

**Lengyel Eszperantó Rádió!**

http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml

**Pola Esperanto Radio!**

http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml

**Magyarország turisztikai honlapja**

2006. decemberrel kezdődött meg régiónként a helytörténetekkel történő feltöltése a MESZ eszperantó nyelvű túrisztikai honlapjának.
Ennek elérhetősége: www.hungario.hu

**Turisma retpaĝo de Hungario**

Ekde decembro de 2006, ekkomenciĝis - po regionoj de Hungario - la enigo de la lokhistorioj de gravaj lokoj al la turisma retpaĝo de Hungaria Esperanto-Asocio.
Ĝia atingebleco, adreso estas: www.hungario.hu

## Pedagógus konferencia

A világ eszperantó tanárainak (ILEI) 40. Konferenciáját Ranzanban, Japánban tartják az idén 2007. augusztus 11-17 között.

*A programválaszték:*

Japán közelről – a kultúrája közvetlenül az Önök szeme elé tárul
Bensőséges körben kolegiáris légkör
Kulturális és kirándulási program
Változó és ösztönző előadások
Szerényköltségű elszállásolás és bőséges program
Eszperantó-tanfolyamok és kellemes esti rendezvények
A Nyelvek Fesztiválja és kultúrák
Szimpózium konferencia-témáról
Ismerkedés a nevelés világával
A tanítási képességek helyesbítése

Fordította: Pásztor Lászlóné

## La 40-a Konferenco de ILEI

La 40-a Konferenco de ILEI okazos en Ranzan, Japanio inter 11-19 aŭgusto 2007.

*La elekteblaj programoj estos*:

Japanio de proksime – ĝia kulturo malfermiĝos tuj antaŭ Viaj okuloj
Kolegeca etoso en intima rondo
Kultura kaj ekskursa programoj
Variaj kaj instigaj prelegoj
Malaltpreza loĝigo kaj abunda programo
E-kursoj kaj agrablaj vesperaj aranĝoj
Festivalo de lingvoj kaj kulturoj
Simpoziono pri konferenca temo
Konatiĝo kun la mondo de edukado
Plibonigo de Viaj instrukapabloj.

(De listo „lokaj-esperanto-grupoj: Aida Cizikaite kaj Tieko Isikawa)

**Új eszperantó szervezet a Balatonnál!**

Új, 2006. decemberben cégbejegyzett eszperantó szervezet kezdte meg a működését a Balaton déli partján. Siófokon és Tabon tevékenykedik és hála Szányel Csabának, már saját web.lapja is van:

http://www.esperanto-balaton.tar.hu

Ott szervezik az Ifjusági Eszperantó Találkozót Tabon 2007. április 13-15-ig.
Információ: Lukács Árontól: esperanto@g.mail.com

**Nova Esperanto organizaĵo ekfunkciis ĉe la lago Balatono!**

Nova, en la 2006. jara decembro prokurita organizo ekfunkciis sur la suda bordo de la lago Balatono. Ĝi agadas en Siófok kaj en Tab kaj danko al la prezidanto Csaba Szányel (Ĉaba Sanjel), ili havas jam ankaŭ propran retpaĝon:

http://www.esperanto-balatono.tar.hu

Oni organizas la Junularan Esperanto renkontiĝon en Tab: la 13-15-an de aprilo en 2007.
JER 2007 Tab

Informacio de: Áron Lukács
esperanto@g.mail.com

**Eszperanto-Rádió Jászberényben!**

Már éjjel-nappal hallgatható az eszperantó Rádió Jászberény műsora! Az elérhetőségét megtalálhatják a Barátság Eszperantó egyesület honlapján.

http://esperantoszolnok.ini.hu

http://87242.26.81:8000/listen.pls

**Esperanto-Radio en Jászberény (Jasberenj)!**

Jam tage-nokte estas aŭskultebla la programo de Esperanto-Radio Jászberény!
La atingeblecon de la radio vi povas trovi sur la hejmpaĝo de Amikeco Esperanto-Asocio:

http://esperantoszolnok.ini.hu

http://87.242.26.81:8000/listen.pls

## Olaszországi Országos Eszperantó Kongresszus

Az olasz eszperantisták Pisában rendezik meg a 74. országos Eszperantó Kongresszusukat 2007. szeptember 1-6-ig.
Részletes információkért forduljanak az alábbi honlaphoz:

www.esperanto.it/html/fei/kongreso.htm

Fordította: Pásztor Lászlóné

## Esperanto Kongreso de Itala Esperanto Federacio

La italaj esperantistoj aranĝos sian 74-an Landan Esperanto Kongreson en urbo Pisa, la 1-6-an de septembro 2007. Por akiri detalajn informojn bonvolu viziti la suban retadreson:

www.esperanto.it/html/fei/kongreso.htm
(„Amerio"f.amerio@carpani.homelinux.net)

## Halgassa az olasz eszperantó rádiót!

Örömmel adjuk tovább a hírt az olasz eszperantó rádió adásairól is.
Elérhetősége:

www.international.rai.it/radio/multlingue/presentazioni/esperanto/shtml

## Aŭskultu la italian Esperanto Radion!

Ĝoje ni pludonas la informon pri la funkcio de italia Esperanto radio Ĝia atingebleco estas:

www.international.rai.it/radio/multlingue/presentazioni/esperanto/shtml

## Nemzetközi Ifjúsági Fesztivál

Nemzetközi Ifjúsági Fesztivált rendeznek Húsvét-hetében 2007. április 5-10 között Lignano Sabbiadoroban (UDINI) Olaszországban. Bővebb információt kaphatnak F. Ameriótól:

Ameriof.amerio@atc.torino.it

## Internacia Junulara Festivalo

„Internacia Junulara Festivalo 2007" okazos dum la Paska semajno 5-10 aprilo 2007, en Lignano Sabbiadoro (UDINI). Pliajn informojn petu de F. Amerio:

Ameriof.amerio@atc.torino.it

## Nemzetközi Nőnap Hirosimában

A japán városból Hirosimából január végén én Pásztor Lászlóné Adrienne béke-együttműködésre kaptam felkérést Osioka Takeotól, hogy üdvözöljem a 25. Hirosimai Nemzetközi Nőnapot.
Meghatározta a küldendő nőnapi üdvözlet témáját. Igenlő választ adtam és versbe foglalt üdvözletemet elküldtem a felkérő személynek.
A vers szövege a kérésnek megfelelően háború-ellenes, bemutatja a háború borzalmait, békevágyat sugall és egyben nőnapi üdvözlet is. A vers magyar nyelvű szövege a következő

## HIROSIMAI NŐNAPRA – 2007

Derült égből villámcsapás,
szétlőtt gyárak és üzemek.
Így ért minket a támadás,
fegyverek; tankok…seregek.

Égő házak és házromok.
Koldusok, árva-otthonok.
Elkurvult nők, utcán halott.
Nyomorékok, s fosztogatók.

Nem akarunk: éhinséget,
életünkért rettegni,
lebombázott óvóhelyet,
atom-bombát elszenvedni!

Akarunk mind: nyugodt éltet,
derűt, munkát és tanulást.
Termő-földet, mezőt, melyet
csizmasarok nem tapos már,

nemzetek közt megegyezést,
kulturális csereberét,
ne szentesíthesse törvény:
a háború igenlését!

Jót akarunk: jövő esélyt!
Eszperantót, s világbékét!
Mindig legyen: mád, s holnapod!
Legyen boldog a Nőnapod!

(Írta: Pásztor Adri 2007. január 28-án)

## Internacia Virintago en Hirosima

El la japana urbo Hirosima, je fino de januaro: mi Adrienne Lászlóné Pásztor ricevis alvokon de Osioka Takeo, je packunlaboro por saluti la 25-an Internacian Virino-Tagon.
Ŝi decidis la temon de la sendenda virintaga saluto. Mi akceptis la taskon jese, kaj sendis mian poem-saluton al la persono de la petinta.
La teksto de la poemo devis esti – laŭ la antaŭdecidita peto de la petanto – kontraŭmilita, prezentante la terurаĵojn de la milito, sugestu pac-sopiron, kaj estu samtempe ankaŭ saluto al la 2007-a Virintago de Hirosima.
La esperantolingva poemo estas la sekva:

### AL VIRINTAGO DE HIROSIMA – 2007

El helĉiel fulmofrapo.
La fabriko dispafita.
Armilo: tanko…armeo,
okazas atak' milita!

Domruinoj, domoj brulaj.
Almozuloj, orfo-hejmoj,
multvirinoj putriniĝaj,
kripliĝo, morto, rabadoj!

Ni ne bezonas: la hungron!
Pri nia viv' timtremegi,
la bombarditan ŝirmejon,
atom-bombon devtoleri!

Ni volas: trankvilan vivon!
Estu: laboro, lernado,
agro, kampo kaj sur tion
ne surtretu bot-kalkano

internaci-akordiĝo,
kulturo-interŝanĝado,
ne promulgeblu la leĝo:
la komencon de l' milito!

Ni bonvolas: estont'- ŝancon!
Esperanton kaj mondpacon!
Ĉiaman nunon, morgaŭon!
Havu: ĝojan Virintagon!

(Verkis Adri Pásztor, la 28-an de januaro 2007)

## Vietnami Eszperantista Fiatalok

A vietnami eszperantista ifjúsági szervezet a VEJO új szervezete a Vietnami Eszperantista Ifjúságnak és a 44. Tagozata a Világ Eszperantista Ifjúsági Szervezetnek (TEJO). Ez azzal a céllal alakult, hogy hozzájáruljon az eszperantista ifjúsági mozgalom kibontakozásához, az együtt munkálkodással kiszélesítse a szolidaritást, a barátságot a kölcsönös megértés alapján az eszperantisták között. Jelenleg sok tagjuk van, akik aktivitásukkal és azonos eszmei indíttatással szívesen járulnak hozzá a Nemzetközi Ifjúsági Kongresszushoz.
A kongresszust **2007. július 27 - augusztus 3**-ig tartják Hanoiban Észak-Vietnamban.

A Kongresszusról tájékoztatást ad:
**Lai Thi Hai Ly** - kisasszony, **elnöknő** zamenhof@fpt.vn

Pásztor Lászlóné a http://aktivulo.com.ijk alapján

## Vietnama Esperantista Junularo

La Vietnama Esperantista Junulara Organizaĵo (la VEJO) estas nova organizaĵo de la Vietnama Esperanto Junularo kaj la 44-a landa sekcio de TEJO. La VEJO tial fondiĝis(landsekciis), ke kontribuu al la disvolviĝo de la junulara movado de Esperanto kaj plilarĝigu la solidarecon, amikecon helpe de la kunlaboro sur bazo de la reciproka interkompreno inter la esperantistoj. Nuntempe la VEJO havas multajn membrojn, kiuj per siaj aktivecoj kaj samideane kontribuas al la Internacia Junulara Kongreso.
La Internacian Junularan Kongreson ili organizas inter la 27-a de julio –la 3-a de aŭgusto 2007 en Hanojo, Nord- Vietnamio.

Pri la IJK informojn donas:
s-ino Lai Thi Hai Ly prezidantino zamenhof@fpt.vn

Laŭ la http://aktivulo.com.ijk Adrienne, s-rino Pásztor



Bükki zuzmótelep/ Likenobazo en montaro Bükk (Foto de Ferenc Pásztor)

**ADA SIKORSKA-FIGHIERA**

Karaj niaj legantoj!

Bonvolu akcepti la novan parton de Taglibro de la 11 jaraĝa Ada Sikorska.

**Ada Sikorska - Fighiera**

## De tajgo al minaretoj

**- dua parto -**

### EN TIESOVAJA

**25.IX.1940. –** Grandega ŝanĝo! La 21-an de septembro la komandanto anoncis, ke ĉiuj devas enpaki siajn aĵojn, ĉar sekvatage, je la 3-a matene, ni devas esti pretaj por vojaĝo. Ni dormis preskaŭ komplete vestitaj. Tamen oni foriris nur je la 8-a. Unue per tiu „ludila" trajno al Ĥaritonovo, de tie per barko, tamen nur la pakaĵoj eniris la barkon, tiratan de motorŝipeto kaj sur ili la infanoj – ĉiuj plenkreskuloj devis iri piede laŭ la riverbordo, 35 km! Poste ankoraŭ 8 km.(la aĵoj sur ĉaro), kiujn la infanoj ankaŭ faris piede. Al la celo ni alvenis post noktomezo, morte lacaj, do oni ĵetis sin dormi kie ajn, en vestaĵoj. Nur sekvamatene ni konstatis, ke ni troviĝas en iu tre malorda ĉambro, kun 5 fremdaj personoj (krom ni 7). Ilin oni enmetis en alian ĉambron, ni restis 9-ope, krom ni unu juna geedza paro. Tuj oni komencis la ordigadon. Precipe Hermano, kiu scipovis ĉion fari, tre aktivis, eĉ konstruis aŭ fakte rekonstruis novan fornon. Super la lavitaj fenestroj la avino pendigis broditajn el malnovaj littukoj, kurtenetojn – kaj la ĉambro fariĝis iel akceptebla. Ni ricevis tri litojn, tablon, benkojn, komodon kaj vestaĵ-pendigilon. Ne estas multe da spaco: naŭ (poste 7) personoj devas tie vivi, dormi, manĝi, lerni, kuiri, lavi sin ktp. Necesejo estas en la koridoro, unu por ĉiuj 4 ejoj (ĉiu barako havas ĝuste kvar ejojn.)

La komandanto ŝatas veni ĉe ni kaj ĉiam diras, ke ĉe ni estas tiel pure kaj bele kaj neniu kverelas…

La viroj komencis sian arbar-laboron (devige), ankaŭ ni devige iris al la lernejo.Ĝi estas sufiĉe bona por vilaĝo kiel Tiesowaja, „posiolek" ruse, kio signifas „setlejo" – ja eĉ personoj, kiujn ni trovis tie, ne estas indiĝenoj – en la 30-aj jaroj oni deportis ilin el la regiono de Minsko – kaj iom da germanoj. Feliĉe, ĉiu el ili havis almenaŭ 1 bovinon kaj malgrandan terenon por kultivi terpomojn. Ili ne vendis kontraŭ mono, sed interŝanĝe por la vestaĵoj.

Min oni destinis por la V-a klaso (ĝis la milito mi finis la 4-an kaj en Lvovo la 5-an) kaj Manjon al la I-a. Mi ne konis la lingvon, krom la alfabeto kaj kelkaj vortoj. Kaj ĉar mi nenion komprenis, la rezultoj estis malbonaj. Almenaŭ en la komenco.

Pro manko de taŭgaj vestaĵoj, pro malbona kaj nesufiĉa nutrado, ni ambaŭ sufiĉe ofte estis malsanaj: gripoj alternis kun anginoj, tusoj kun kataroj kaj mankvitaminaj malsanoj de la haŭto. Ni ambaŭ tusis kelksemajne ĉiam.

Ĉiu laboranto kaj infanoj „ricevadis" po 400gr. da nigra pano , ne sufiĉe bakita, kiun ni poste iel „tostis" sur la blato de la forno.Se en iu familio estis viroj, kiuj laboris, ankaŭ virinoj havis rajton je pano: ĉe ni estis tri viroj, kiuj oficiale fariĝis „ kuzoj" de mia Panjo. Efektive laboris nur du, Ignaco kaj Emilo. Hermano sukcesis aranĝi por si atestilon kuracistan, ke lia kruro malhelpas lin labori. Kiel li tion akiris – restis lia sekreto. Ke li ne iris al la arbaro, ne signifis, ke li ne laboris: li estis tiu, kiu iris ĉe la minskanoj kaj kontraŭ belaj vestaĵoj de mia Panjo, kontraŭ diversaj aliaj objektoj, alportis lakton kaj terpomojn. Tio jam estis io: 1 litro

da lakto ĉiutage kaj kelkaj kg. da terpomoj, permesis al mia Panjo eĉ fari tagmanĝojn: ni ne kalkulis, kiom da pladoj ŝi „inventis" surbaze de tiuj du produktoj.
De tempo al tempo venadis de niaj familianoj el Lvovo, pakaĵoj kun iom da nutraĵoj, papero (kovertoj ankaŭ tie ne estis aĉeteblaj, ni faris ilin el faldita speciale papero). La pakaĵoj ne povis esti oftaj, ĉar estis sufiĉe malfacile sendi ilin (ne el Lvovo), krome ili mem ne havis sufiĉe. Sed ĉiu pakaĵo estis granda festo en nia „arbar-dometo", kiel ni ĝin nomis sentimentale.
Inter miaj oftaj malsanoj mi frekventis la lernejon. Ni estis pli ol 20-ope en la klaso, duono polaj lernantoj, duono sovetaj. En la lernejo estis malvarme (ekstere dumvintre ofte estis -25, -30, eĉ -45!) kaj la instruistoj, post lecionoj, „edukadis" nin dum horoj, rakontante la **veron** pri nia vivo en libera Pollando! Ni „ eksciis", ke nur en Sovetunio estas vera libereco, ke nur tie ĉi oni bone zorgas pri la infanoj, ĉe ni, ni estis batitaj de la „popoj" kaj instruitaj primitive!...Nu, iom post iom, kiam ni komencis ĉiam pli kaj pli kompreni, la polaj lernantoj eĉ pli bone lernis ol tiuj lokaj! Je la fino la diktaĵojn mi skribis eĉ sen unu eraro kaj ĝenerale tre bone parolis ruse.
**6.XI.1940.** – El mia letero: „Estis letero el Lvovo, ĉiuj ĝojas! Ekde morgaŭ ni havas en lernejo 3 liberajn tagojn, ĉar estas „tre granda festo", la datreveno de la revolucio. Eble ni ricevos iujn dolĉaĵojn kaj eble aĉeteblos faruno, kiel oni promesas. Morgaŭ matene en la lernejo estos „matineo". Sed, ĉu vi scias, onklino, kiel aspektas tie ĉi lernejo: kajerojn oni povas aĉeti en tre limigita kvanto, skribiloj tute ne estas kaj la paperkvalito estas pli malbona ol nia toaletpapero! Oni tute ne povas skribi sur ĝi…kaj ĉu en Lvovo oni ankoraŭ povas aĉeti paperon? Ni ne havas sur kio skribi leterojn. Da neĝo estas jam duonmetro. Hodiaŭ degelo, glite, oni povas rompi la krurojn! En la lernejo estas ĉiam tre malvarme. Eble okaze de la festo ni ricevos dolĉan teon kaj kukon. Estus bele…Ĉu vi memoras, kiam en Lvovo la Panjo diris „kiel la rusoj povas fumi tabakon en gazetpecoj!" kaj nun mem ŝi tion faras. Bone ke estas. Unu sinjoro lernas ĉe mi skribi ruse…"
Efektive, la teo estis dolĉigita, da kuketoj ni ricevis po 3, eĉ sufiĉe bonaj.
Ofte oni faras, ke sabate ni ne iras al lernejo, sed devas esti tie dimanĉe. Kiu scias, kial?
**3.XII.1940.** – Ni ricevis kelkajn pakaĵojn kun libroj, puraj paperpecoj (leteroj), koloraj paperpecoj por fari kristnaskajn ornamaĵojn. Estas, -30 C°, malvarmege! Sed al la lernejo ni devis iri.
**7.XII.1940.** – Mi havas flavmalsanon kaj devas resti hejme. La kuracistino diris, ke mi manĝu multe da sukero kaj fruktoj(!).Sprita ŝi estas!...
**18.XII.1940.** – Mi denove havis kelktagan gripon kaj ne povis iri al lernejo. Mi profitis kaj faris multajn kristnaskarbajn ornamaĵojn. Post kelkaj tagoj estos Kristnasko, la frosto atingas foje -43 C°!. Falis multe da neĝo.
**28.XII.1940.** – La tago de la 24-a de decembro estis normala tago, ni devis iri al la lernejo kaj la viroj al la arbaro.Vespere ni ĉiuj sidis ĉetable, sur la komodo staris malgranda pinarbo, kiun el la tajgo alportis Ignaco, ornamita per niaj ludiloj faritaj el ricevitaj koloraj paperetoj. Kiel menuo estis pizo-supo kaj terpombuloj en lakto – originala! – por deserto: ricevitaj el Lvovo bombonoj. La etoso sufiĉe bona, neniu ploris, ni ĉiuj estis „kuraĝaj, kiel la poloj devas esti…"Nur libera loko ĉetable turnis niajn pensojn al la Paĉjo. Kion li nun faras?
Hodiaŭ alvenis pakaĵo el Lvovo, kompreneble de la onklino Lunia. Mi estis iranta al la lernejo kiam ĝi alvenis. Kaj kiam ni revenis, kia ŝanĝo! La kristnaska arbeto estis multe pli bela: „orumitaj" nuksoj „anĝelaj haroj", steletoj, kandeletoj – belega! Kaj sub ĝi kuŝis donacoj: sakoj por lernejo, pupoj, bombonoj! Karega Onklino!...Nun la tuta loĝantaro de la barakoj venas por vidi tiun mirindaĵon. Eĉ la komandanto venis kaj multe laŭdis ĉion. Kaj ni ĉiuj pensis, ke venontjare ni certe ne estos en Tiesovaja!...
**3.I.1941.** – De la 1-a ĝis la 15-a de januaro ni havas libertempon. La 31-an de decembro en nia lernejo estis „balo". Krom ni, venis ankaŭ la Panjo kaj Hermano. Ĉio komenciĝis je la 21-

a h. Kiam la Panjo kaj Hermano dancis fokstroton, ĉiuj aplaŭdegis! La dancado daŭris ĝis noktomezo kaj je la fino la anstataŭanto de la komandanto dancis kozakon. Sekve ĉiuj transiris al alia klaso, kie staris granda novjara arbo (ĉe ili ne estas kristnaska, nur novjara kaj anstataŭ sankta Nikolao estas Onklo Frosto), sufiĉe bele ornamita, sed sen kandeloj (ne estas). La gelernantoj kantis, akompanataj de akordiono kaj violono. Poste ĉiu ricevis glason da sukerita teo kaj kelkajn sekajn kuketojn – almenaŭ io. Aha, ankoraŭ po 3 bombonoj.
**5.I.1941.** – Kvankam la frosto estas pli malgranda, mi ne foriras, ĉar denove mi estas malvarmumita. Denove mi havas nenion por legi. La sola „distraĵo" estas skribi leterojn kaj taglibron.
**17.I.1941.** – Nekredeble, tamen vere: Hermano ricevis de la komandanto permeson vojaĝi al Solviĉegodsko. Eble li povos ion aĉeti…
**22.I.1941.** – „La tago de la memoro pri Lenin" – ni ne iris al la lernejo kaj la viroj al la arbaro – verŝajne ili pasigos la tagon en „vico", ĉar la butiko estas malfermita.
**25.I.1941.** – Hodiaŭ 20 personoj el nia transporto forveturis al Ĥaritonovo, fakte ili foriris piede, nur la pakaĵoj kaj 2 malsanuloj estis sur la ĉaro (sledoj). Granda frosto, da neĝo preskaŭ 1 m. Sed la Reĝino Vintro nenion volas pentri sur la sovetaj fenestroj. Ĉirkaŭ ni estas neĝa dezerto kaj ĉe la horizonto malhela muro de arbaro….

**27.I.1941.** – Hermano revenis hieraŭ vespere, alportis kelkajn ludilojn por ni, dominon, iom da (ne tre bonaj ) ĉokoladaj bombonoj.Ĉiuj ĝojas pro lia reveno, ĉar li alportas ĉiam ridon kaj vivon.Hodiaŭ ankaŭ translokiĝis al alia ejo la geedzoj Renata kaj Mietek, do finfine estas iom pli da spaco: ni restis sep-ope.
**10.I.1941.** – En la lernejo mi komprenas pli bone, jam unu fojon ricevis bonajn notojn de geografio kaj historio. La vetero estas bela, suno brilas, sed -35 C°. En miajn ski-ŝuojn la Panjo metas gazetojn anstataŭ ŝtrumpoj. Ni lernas skii en la lernejo, sed strange, sen apogiloj.. Krom tio ni ne estas bone ekipitaj.
**26.II.1941.** – Tre malbona vetero: frosta ventego kaj huragano. Denove parto el nia transporto estas translokata al alia loko. Je la $6^{00}$ matene sur tri grandajn sledojn oni metis la pakaĵojn de la forveturantoj. Ĉe ni venas ĉiun momenton iu por adiaŭi. Estas kortuŝaj scenoj, neniu ja volonte ŝanĝas loĝlokon en tiaj cirkonstancoj, ne sciante, kiel estos tie? Je la 8-a ĉio estas preta. Sur la sledoj veturas nur kofroj kaj unu virino kun bebo – ĉiuj aliaj iras piede. La Avinjo, apogita al la brako de Emilo, rigardas la scenon. Emilo diras: „Bedaŭrinde, ke ne troviĝas inter ni nova Grottger / fama pola pentristo el la l9.jc./, kiu eternigus tion sur pentraĵo". La Avinjo respondas: „Rusujo blanka aŭ ruĝa, kaj la poloj ĉiam deportataj". La „karavano" ekiris nur je la 9-a kaj 30'.
**9.III.1941.** – Hodiaŭ estas mia nomtago, do kun Manjo ni faris „akcepton" por la Panjo, Avino kaj la pupoj: ni kuiris terpomsupon, kun unu sola cepo fritita (ni ricevis de iu) kaj iom da „kabul" (loka saŭco). Por deserto estis bombonoj.
Mi jam pli bone lernas, preskaŭ ĉiutage ricevas bonajn notojn, ne mirige: mi pli bone komprenas. Hodiaŭ la instruisto de literaturo tiel diris al ni: „ni bone scias, ke infanojn en kapitalistaj landoj oni batas en lernejoj: vi ne devas tion kaŝi, la ĉefan pozicion havis „popo" /?/ kaj la instruado estis tre malaltnivela! Nur ĉe ni estas vera kulturo. (!!!)
La arbarlaboristoj devas nun labori ankaŭ dimanĉe, do sep tagojn sur sep sur sep. Bele!
**22.III.1941.** – Hieraŭ ni ricevis en lernejo la atestilojn. Mi havis nur unu malbonan noton, de botaniko (estas ¾ -jaro). Mi entute forestis 102 lecionojn – tio estas miaj daŭraj malsaniĝoj. Kaj nun ni havas 9-tagan printempan libertempon. Ni preparas spektaklon, kiun mi trovis en unu el la ricevitaj el Lvovo polaj revuoj „Sonĝo aŭ realeco?"
**6.IV.1941.** – Pasintan dimanĉon ni ludis nian teatraĵon: ĉio iris bone! Ludis nur infanoj. Mi estis sankta Nikolao kaj Patrino, Manjo ludis la rolon de Jaĉjo, alia knabino tiun de Hala kaj kvar malgrandaj knabinoj estis koboldoj. Kostumojn ni faris el diversaj vestaĵoj de

plenkreskuloj, barbojn el kotono. La tuta barako spektis. Ni vendis biletojn po 30 kop. (1/3 da rublo) kaj la profiton transdonis al unu maljuna judo, sola, sen familio. Oni petis nin ripeti venontan dimanĉon.
La komandanto detale demandis al Hermano, kia parenceco estas inter ni. Li diris, ke lia patrino kaj tiu de mia panjo estis fratinoj."Sed vi estas judo kaj ŝi ne" – diris la komandanto. Li respondis, ke mia avino enamiĝis en polan katolikon kaj baptiĝis. Kaj la komandanto kredis…
La Panjo estas ege laca. Ŝi leviĝas je la 5-a matene, por doni matenmanĝon al la du, kiuj je la 6-a kaj 30' devas foriri labori en la arbaro.
Poste ŝi la tutan tagon estas okupita, ĉar gardi ordon en la 20 m² ĉambro, kie sep personoj faras ĉion, ne estas facile. Ĉiutage ŝi devas senŝeligi 16 kg da terpomoj por du manĝoj – kaj oni tute ne povus diri, ke ni estas sataj. (ĉar tio estas nia sola produkto), krom nigra, nesufiĉe bakita pano (400gr. po persono) kaj iom da lakto, ĉefe por ni, infanoj. Kaj ĉio tio danke al la vestaĵoj de mia Panjo, littukoj, ktp. Sed ankaŭ tio finiĝas…
**18.IV.1941.** – Tie ĉi ankoraŭ ne venis printempo! Ankoraŭ kuŝas multe da neĝo….
**20.IV.1941.** – Dimanĉo. Ĉiudimanĉe ni ludas kune kun aliaj infanoj „polan lernejon" kaj ni instruas skribi pole tiujn, kiuj ne komencis lerni antaŭ la milito.
**22.IV. 1941.** – Hodiaŭ tute printempa vetero, la suno brilas kaj estas sufiĉe varme. En la lernejo, ĉiusemajne ni havas „politikajn kunvenojn", dum kiu instruisto legas al ni gazeton kaj parolas pri politiko. Pri kapitalistaj landoj kaj pri la unua „socialista" lando! Preskaŭ de ĉiuj fakoj mi havas nur bonajn notojn, sed ne de la „milit-afero". Kaj tio, ĉar tiam ni devas lerni…historion de la partio! Tute ne interesa afero por 12-jarulino!...
**2.V.1941.** – Okaze de la 1-a maja festo ni havas tri liberajn tagojn. Vizitis Tiesovaja-n ankaŭ viroj, kiuj por certa tempo devas labori en alia loko kaj portis al ĉiuj florbranĉojn. Hieraŭ denove estis „akcepto" kaj post kultura matine oni ricevis (en la lernejo) 4 kuketojn, 4 bombonojn kaj glason da…(ĉifoje) nesukerita teo – ni trinkis ĝin kun bombono en la buŝo.
**14.V. 1941.** – Ĉiu el la deportitoj ricevis terpecon por kultivi. Sed tie troviĝas radikoj de tranĉitaj arboj, do forigi ilin ankaŭ ni estus devintaj! Ni ne estas tiel stultaj!...Ni faros ĉion kaj „ili" kolektos! Neniu kredas, ke ni pasigos tie ĉi ankoraŭ unu jaron…Post 2 tagoj fino de la lernejo, poste ekzamenoj ĝis la 2.VI kaj libera tempo. Estas jam bela vetero kaj en suno tre varme, sed sur la vojoj kaj kampoj ankoraŭ multe da koto kaj eĉ neĝo. Antaŭ nelonge mi havis sonĝon: alvenis marŝalo Piłsudski al Tiesovaja, venis al ni, parolis kun ni. Poste iris al la komandanto, revenis kun pola soldato, al kiu li ordonis informi ĉiujn polojn en ĉiuj barakoj, ke ni revenas al Pollando…
**19.V.1941.** – Hodiaŭ finiĝas la lernejo.Manjo ricevis sufiĉe bonajn notojn, mi ankaŭ; ne havante eĉ unu malbonan noton, trapasis al la sesa klaso.

*

Tiun ĉi parton de la taglibro, kiu koncernas la vojaĝon kaj restadon en Sovetunio, mi povis skribi surbaze de miaj leteroj, kiujn de la komenco de aŭgusto 1940 ĝis la komenco de junio 1941 mi skribis al Lvovo, al la onklino Lunia. Ŝi heroe gardis ĉiujn tiujn leterojn dum la malfacilaj jaroj kaj enmanigis al mi, en januaro 1949, kiam – post reveno al Pollando ( 23.XI.1948), ni vizitis ŝin en Krakovo. Bedaŭrinde, la letero de la 19.V. estis la lasta, kiun ŝi ricevis, ĉar kiel sciate – la 22-an de junio la hitlera Germanio atakis Sovetunion kaj la tuta situacio ŝanĝiĝis. Poste, en Isfahano kaj Libano mi regule skribis taglibron.

*

La 30-an de julio, generalo Władysław Sikorski sukcesis fari pakton kun Stalin, anoncitan la 12-an de aŭgusto1941, per kiu Sovetunio liberigis ĉiujn polojn deportitajn kaj enkarcerigitajn (preskaŭ 2 milionoj) en la vasta landego. Bedaŭrinde, ne ĉio estis tiel rozkolora, kiel aspektis, ĉar en pluraj malproksimaj aŭ „perditaj" lokoj oni eĉ ne sciis, ke io simila okazis. Pli-malpli duono de la poloj simple ne eksciis, ke ili estas liberaj….

*

Kiam nia komandanto anoncis al la kolektitaj „rifuĝintoj" – „vi estas liberaj", ĉiuj ekstaris kaj ekkantis la himnon de „tiu, kiu neniam pereos!" La saman tagon la Panjo vendis la du lastajn kovrilojn, por telegrafi „fulmrapide", kun pagita respondo, al Paĉjo en Starobielsk. Sed la respondo ne venis…Certe la Paĉjo ne plu estis tie, sed do kie?...
Dume ni translokiĝis al alia „ posiolok" (setlejo) Koriaĵma. La Panjo sendadis telegramojn al ĉiu direkto, al generalo Sikorski, al aliaj generaloj, sed de ĉie venis respondoj: „la sorto nekonata…"
Ni multe zorgis…
En tiu Koriaĵma mi denove malsaniĝis, amaso da abscesetoj sur la piedo-platoj, sekve de kio mi kuŝis preskaŭ unu monaton. Manko de vitaminoj kaj neadekvata nutraĵo dum preskaŭ 2 jaroj kaŭzis tion. Fine alvenis la tago de nia vojaĝo al la sudo. Pri ĉio okupiĝis Hermano kaj tie ĉi mi devas aldoni, ke se ne estus li, mi ne scias, kiel ni estus povintaj vojaĝi: estis li, kiu iris ĉien kaj dirante, ke li havas kun si la Familion de gen. Sikorski (la rusoj ŝajne ne komprenis, ke temas pri alia gen. Sikorski, kiun ili tenis en siaj manoj kaj kiun oni ne povas retrovi), kaj tiu nomo malfermadis ĉiujn pordojn.
En unu oktobra tago ni ekveturis. La vetero estis malbona, pluvis kaj ventis. Ni piede devis marŝi dum la tuta tago, tra riveretoj kaj koto. En la haveno ankoraŭ ne estis ŝipo. Ni eksidis ĉe fajro, por iom sekiĝi kaj varmiĝi. La ŝipo alvenis nur matene. Al Kotlaso ni alvenis posttagmeze; pluvis daŭre. Du tagojn ni devis atendi tie, ĉar nun la Panjo malsaniĝis. Finfine post tri tagoj ni povis iri al stacidomo: en vagonaro iranta suden ni eĉ trovis kuŝlokojn ( malmolajn). La plej teruraj estis trajno-ŝanĝojn, eble l5-foje ni devis iri de unu trajno al alia. Post kelktaga veturado la pejzaĝo komplete ŝanĝiĝis: la tajgajn arbarojn anstataŭis stepoj, dezertoj, kameloj kaj orientaj homtipoj. Viroj portis sur kapoj strangajn turbanojn kaj virinoj havis nigrajn densajn retojn por kovri la vizaĝon. Tamen ne ĉiuj, nur maljunaj. Samtempe kun la ŝanĝo de klimato videbliĝis amaso da fruktoj: melonoj, vinberoj, persikoj ktp. En Taŝkento, la ĉefurbo de Uzbekistano, ni forlasis la trajnon kaj en iu korto, sur valizoj ni tranoktis. Sekvamatene ni iris al Samarkando.

## SAMARKANDO

Ni alvenis tien fruvespere. Atendante longe en vico ni lasis la pakaĵojn en la gardejo kaj mem tranoktis en iu salono…surtere! Nur unu tagon poste, en la evaku-punkto, oni sendis nin al la 7-taga kvarantano. Sed Hermano agis kaj jam sekvatage oni liberigis nin kaj donis 2-ĉambran loĝejon en la domo de la oficiraj familioj (sovetaj). Tion kompreneble kaŭzis la magio de la nomo Sikorski. Komuna kuirejo troviĝis en korto. Emilo kaj Ignaco eklaboris en pan-vendejo. Ni bone uzis tiun ŝancon: mi kaj Manjo iris tien kelkfoje tage kun pan-kuponoj, la „ vendistoj" ŝajnigis, ke ili fortranĉas pecon. Tiel ni havis grandan rezervon da pano hejme kaj ĉiu vizitanta nin eks-malliberulo pola, kiu ne havis tiel bonajn kiel ni kondiĉojn, ricevadis belan rondan panon.

Baldaŭ ni rekomencis la lernejstudadon, nun en la 6-a klaso, Manjo en la 2-a. Ofte la samklasanoj venis al mi dirante: „Oh, via paĉjo estas en Moskvo”, ĉar ĉiuj pensis, ke la generalo kaj ĉefo de la pola registaro eksterlande, Władysław Sikorski, estas mia patro. Mi eĉ ne ĝustigis tion.
Vintro en Uzbekistano estis tute alia ol en profunda nordo, oni preskaŭ ne sentis ĝin.
Komence de printempo mi havis atakon de iu malsano, stranga, sed ne malario. Dum unu semajno mi havis 39° C febron, sed la ekzameno de la sango ne trovis malarion. Mi devis kuŝi 5 semajnojn. Poste, ĉiun duan tagon mi havis tre fortan doloron de kruraj muskoloj kun alta febro. Poste la muskola doloro foriris, sed sur la kruroj formiĝis ŝveliĝantaj grandaj punktoj, ankaŭ kun febro. La kuracistoj nomis tion „pelagra”.
La printempo jam plene regis, kiam alvenis la plej granda ŝanĝo en nia vivo…

## AL IRANO

La situacio en Sovetunio ne estis tre optimista, printempe 1942. La germanoj daŭre progresis, penetrante la landon pli kaj pli. Mia Panjo serĉis iun eblecon forveturi. Sed kien? Oni konsideris eĉ la vojaĝon al Hindio, kun pola orfejo. Sed, tute ne atendite, oni renkontis nian onklon, fraton de la Paĉjo, Adamon, kolonelon, kiu estis enkarcerigita en Kievo kaj post la amnestio, jam libera, troviĝis en Jangijul (nemalproksime de Samarkando), kie formiĝadis pola armeo. Li ankaŭ nenion sciis pri la sorto de nia Paĉjo. Sed li povis enskribi nin en la unuan civilan transporton al Persujo! La ĝojo estis grandega! Niaj junaj najbaroj de la domo ridis, ke antaŭ ol ni atingos la limon, ni revenos…Nu, ni vidos!...
**27.III.1942.** – Hieraŭ ni endormiĝis jam kun ĉiuj aĵoj enpakitaj, ĉar je la 5-a ni devis forveturi. 2 droŝkoj kondukis nin al la stacidomo. Bedaŭrinde, niaj „sinjoroj” devis resti en Samarkando, ĉar la onklo povis enskribi nur la veran familion. La trajno malfruis kaj anstataŭ je la 5-a alvenis je la 10-a. Ni renkontis la ridetantan onklon Adamon. Post la kontrolo de la listo, ni eniris la trajnon, kiu baldaŭ ekmoviĝis. La onklo rakontis al ni siajn travivaĵojn, ni devis rakonti la niajn. Kiam post la „kondamno” de 8 jaroj oni diris al li: „Nu, Sikorski, vi sidos”, la onklo respondis: „sufiĉas”.
Post 3-taga vojaĝo la trajno haltis en Krasnovodsk. Ni devis atendi duontagon por ricevi enirpermeson al ŝipo. Posttagmeze, legante ĉiujn nomojn, laŭvice oni kondukis nin al la ŝipo. Kun batanta pro ĝojo koro mi eniris la ŝipon, kiu devis nin forkonduki de la terura lando de suferoj. Apude staris pli granda, plenigita de soldatoj kaj la kadeta junularo. Finfine la motoroj ekfunkcias.”Ankoraŭ Pollando ne pereis…” ĉiuj kune forte ekkantis. La maro estis trankvila. Ni sidis sur la ferdeko, ĉar kajutoj ne estis, kie post la sunsubiro fariĝis sufiĉe malvarme.
Sed matene la suno tuj varmigis nin. La duan nokton ni profunde dormis kaj ne rimarkis, kiam la ŝipo haltis.

## EN KOLORA PERSUJO

Kiam mi vekiĝis ĉirkaŭ la 2-a, en la malproksimo mi vidis multajn lumojn. Mi endormiĝis denove, por vekiĝi jam dum la tago: tiuj lumoj estis de la haveno Pahlevi. Ekpluvis. Atendis nin tie ŝarĝaŭtomobiloj, kiuj kondukis nin al la tendumejo ĉe la maro. Ni ricevis fromaĝon, daktojn kaj marmeladon. Mi malbone fartis, ĉar mi denove havis atakon de mia „pelagra”, do mi kuŝis.
La onklo loĝis en la „soldata” parto. Ni ricevadis tiom da daktoj, ke baldaŭ neniu povis eĉ rigardi ilin. Tie ni pasigis Paskon. Dimanĉon matene ĉiuj asistis al la pola meso, celebrata de pola pastro. Poste oni reciproke faris bondezirojn, dividante la ovojn..

Finfine, kelkajn tagojn post Pasko, alvenis la horo de forveturo al Teherano. Kiel transportilo servis ne tro novaj aŭtobusoj. La vojo estis treege pitoreska, sed ankaŭ tre danĝera, ĉar ni veturis laŭ tre kurba vojo de la montaro Elbrus. La pintoj estis tute nudaj, sed la valoj, kovritaj de verdaĵo, kun vigla montara rivero, ĉe kies bordoj kreskis multkoloraj arboj, estis belegaj. De tempo al tempo videblis ŝafogrego kun malgranda nigrahara Perso. Frunokte komencis fulmotondri forte, la pasaĝeroj volis tuj halti, sed la plimulto decidis, ke oni veturu al la planita haltejo. Feliĉe ni atingis ĝin kaj post tranoktado (en iu granda ejo) daŭrigis la vojaĝon. Tagmeze la aŭtobusoj atingis la ĉefurbon de Persujo.

## TEHERANO

Teherano estas granda, sufiĉe moderna urbo. Ĉefaj stratoj: Stambul, Lalezar, Ferdowsi, Manuĉeri, Joseabad, Belinekucze ktp. Nur ŝajne malmulte da arboj. El la butikoj kaj vendejoj rigardas nin scivolemaj vendistoj, Persinoj rigardas per unu malkovrita okulo…Ni trairas la urbon kaj eniras la „kampon II", situitan apud la flughaveno. Troviĝas tie kelkaj barakoj kaj kelkaj grandaj tendoj. Meze baseno kaj granda banejo.
Ni ricevis grandan ĉambron kun du aliaj sinjorinoj. Kelkajn tagojn poste komenciĝis matena „lernejo", sub la ĉielo, ĝis la 11-a horo. Sed ni ne longe povis frekventi ĝin, ĉar la 30.IV.1942 la Panjo trovis en la urbo laboron (en hotela baro) kaj ni translokiĝis al la urbo, al la hotelo „Zaringol" (Karanful). Mi, post diversaj malsanoj, estis tiel malforta, ke kuracisto preskribis al mi fortigajn injekciojn.
Dum kelkaj semajnoj mi estis (ni kaj Manjo) en katolika apudmonaĥeja franca lernejo.

- Daŭrigota -

## IDÉZETEK

A nyelv a lét otthona.

Neidegger

A nyelv a legegyetemesebb eszköz, amelyet senki, egyén vagy társadalom nem nélkülözhet.

Bárczi Géza

Az élet egyre komplikáltabb és nehezebb lesz. Nem lesz időnk száz nyelvet tanulni. Gondolkodni kell tehát arról, hogy anyanyelvünk mellett egy közös nyelvvel élhessünk…

Ady Endre

(Böde Józsefné tudományos munkatárs gyűjtéséből – OIK Budapest)

## CITAĴOJ

La lingvo estas hejmo de la ekzisto.

Neidegger

La lingvo estas la plej universala ilo, kiun nenia persono aŭ socio povas malhavi.

Géza Bárczi

La lingvo iĝas ĉiam pli komplika kaj malfacila. Ni ne havos tempon ellerni centojn da lingvoj. Do, ni devas pensadi pri tio, ke apud nia gepatra lingvo ni havu komunan lingvon…

Endre Ady

(El kolekto de scienca kunlaborantino Ilona Böde – Landa Fremdlingva Biblioteko Budapest)

**Julianna Vas-Szegedi**

## Vi silentas

Kara, kial vi silentas,
Mi vin ne komprenas.
Foj-foje mi tiel sentas,
Ke la vort' vin ĝenas.

Kara, kial vi silentas
kaj ne diras vorton?
Ĉu vi interne ne sentas
Nian saman sorton?

(Printempo, 2006)

## KIRÁLY LAJOS

Eszperantó Baráti körünk névadója 1961. január – 10-én halt meg.
Kérjük, fogadják jó szívvel az eszperantó nemzetközi nyelv érdekében írt harmadik újságcikkét. Eszperantó – nyelvtanát külön nem mutatjuk majd be, csupán az OIK által megörzött tananyagról mutatunk képet.

## LUDOVIKO KIRÁLY

La nomdonanto de nia Esperanto-Amika Rondo mortis la 10-an de januaro 1961.
Ni petas Vin, bonvolu akcepti bonkore lian trian artikolon skribitan en intereso de Esperanto.
La Esperanto-lingvan literaturon preparitan de li ni ne prezentos al Vi, nur ĝian bildon pri la ekzempleroj konservitaj de Landa Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto.

## „Augusztusban Miskolcon lesz az Országos Eszperantó Kongresszus”

